

esperantoUSA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1990 (5)

Making News This Issue

Correspondence

Is there a fundamental imbalance in the distribution of Esperanto pen-pals around the world? If there is, what can we as individuals do to solve the problem? This issue's editorial takes a look at this difficult problem.

See Page 2

Youth Group

While there are not many Esperanto youth groups in the United States, several flourish in other countries. Prof. Ĉien Minĉi describes for us in this issue how such a group evolved at a Chinese university.

See Page 6

Poland

San Francisco Esperantist Earl Galvin recently returned from Esperantotur's training course for Esperantist tour guides in Bydgoszcz, Poland. He gives us a first-hand account of his experiences at this international school in one of the world's newest democracies.

See Page 11

In This Issue:

A Beginning Student 4

Review: Guidebook to Correspondence 9

Chinese and Soviet Pen-pals 10

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

Sukceso en Meksiko

38a ELNA-Kongreso

Cathy Schulze

Arriva! 107 kongresanoj el 18 landoj ĝuis eble la plej sukcesan ĝis nun ELNA-Kongreson. Nia ĉijara kongreso servis kiel antaŭkongreso por la monda kongreso en Kubo. Ĝia sukceso plejparte ŝuldiĝas al la prepara laboro de Lusi Harmon kaj ne malpli al la Meksika komitato: Emmi Breuninger, Estela Garza Garcia, Jorge Arteaga Mendoza, Joaquín Rosillo Vega Acosta, Guadalupe Vega.

La Hotelo Reforma provizis ĉion necesan por komforta kongreso. La stabo estis ĝentila, ĉiam glatigis aranĝojn. La manĝoj plaĉis laŭguste kaj preze. La Interkona Vespero en la Reforma restoracio estis gaja kaj vere interkoniga.

Ekskursoj ĉiutage enkondukis la kongresanojn al diversaj facetoj de Meksika kulturo—la praa, hispana, kaj moderna. Interalie oni vizitis la piramidojn, Nacian Universitaton, la faman Antropologian Muzeon, hejmojn kaj ĝardenojn kun tagmanĝo, k.a. Semajne ĉiuj krojis sur la nepra lago Xochimilco. Surprizo atendis min ĉar kvin boatoj portis nomojn en floroj de Lidia Zamenhof, Audrey Childs-Mee, Yukiko Isobe, Ada Fighiera-Sikorska,

kaj Cathy (mi!). Tio estis nur unu el la belaj aranĝoj faritaj de Lusi Harmon.

La Distra Vespero ja distris! Stefan MacGill sprite gvidis la programon. Post lia farsa monologo "La Golflud-Leciono" aperis Teruchiyo Ujitani, magiistino eksterordinara. Si anoncis, ke la kursanoj ĉe San Francisco Ŝtata Universitato nomis ŝin Teruro. Tion dirinte, ŝi ventroparoligis grandan pupon, farante magiajn lertaĵojn. Poste regalis nin ege talenta orkestro per muziko de diversaj landoj. Lerte ili kantigis, dancigis, kaj amuzis nin.

Akcepton por ĉiuj UEA-delegitoj okazigis la usona ĉefdelegito Bill Harmon tuj antaŭ la bankedo. Proksimume 120 ĉeestis la bankedon. Mariachi-orkestro de ok ĉarmaj muzikistinoj ludis la instrumentojn, kantantaj kaj marŝantaj ĉirkaŭ ĉiu el la rondaj tabloj. Refoje, Stefan MacGill aktoris—ĉifoje per Viktor-Borge-eca monologo pri interpunkcio. Staranta ovacio agnoskis la inspiron, brilan festparoladon pri la Esperanto-kulturo far Prof. Duncan Charters, kiu kiel Vicprezidanto de ELNA anstataŭis Prezidanton Ken Thomson, kiu pro malsano ne povis ĉeesti. Mi esperas, ke Prof. d-ro Charters liveros tekston de sia parolado por *Esperanto U.S.A.*

NEW OFFICERS OF ELNA:

President: Angela A. Harlow

Vice-President: Dr. Grant Goodall

Executive Board: Dr. E. James Lieberman

Executive Board: Sherry A. Wells

Executive Board: David Wolff

EDITORIAL

Karaj gesamideanoj!

Mi trovis vian adreson en "Jarlibro de UEA". La afero estas jena. Antaŭ kelkaj monatoj mi publikigis en du tutsovetiaj revuoj por junularo artikolojn pri esperanto kaj ĝiaj ebloj, inter kiuj emfazis internacian korespondadon. Dezirantoj lerni esperanton okazis tre multaj—ĉirkaŭ unu mil. Mi rapide konvinkiĝis, ke adresoj el esperantaj revuoj ne savos la situacion. Tial ni petas vian helpon!

Do, ni bezonas adresojn precipe de gejunuloj el via regiono. Por ni taŭgas ne nepre adresoj de apartaj dezirantoj, sed ankaŭ de grup- kaj kurs- gvidantoj, kiuj povas distribui dezirantojn korespondi

Ĉu vi povas helpi nin en tiu konkreta afero?

Se jes—indiku viajn kondiĉojn. Kiel ni rekompencu vian laboron? Eble per adresoj de niaj gelearnantoj? La listo de korespondemuloj jam pretas.

Aŭ alimaniere.

Indas konsideri, ke intereso al Sovetio dume estas sufiĉe alta, multaj pozitivaj ŝanĝoj altiras la atenton.

Ni tre atendas vian, dezirinde pozitivan, respondon!

Deziras al vi multajn sukcesojn! en la nomo de uralaj esperantistoj

Viktor Kudrjavcev, ab. k. 67, SVERDLOVSK, 620077, Sovetio.

Bonvolu konsideri, ke, bedaŭrinde, Sovetio ĝis nun ne estas ano de Tutmonda Poŝta Unio, tial ni havas certajn problemojn pri "internaciaj respondkuponoj", verdire, ni ilin tute ne havas. Sed ni ne forgesos vian afablon kaj rekomencos vian respondon ĉe proksima bonokazo.

Mi komence intencis verki artikolon pri la ĉijara ELNA-balotado kaj ties rezultoj. Nu, ĉiuokaze mi kaptu la okazon gratuli la sukcesintojn. La nova Prezidanto, *Angela Harlow*, devas esti konata, almenaŭ laŭnomo, de vi ĉiuj; mi, la redaktoro, estas ŝia edzo. Ŝi jam promesis al mi provizi estontece regulajn artikolojn pri la funkciado de ELNA; la unua traktos la rolon de la Estraro, kaj ĝuste nun ŝi arigas materialon por ĝi. La nova Vicprezidanto estas *d-ro Grant Goodall*, lingvisto ĉe la Universitato de Texas (El Paso); ankaŭ lin multaj el vi konas, ĉar en 1989 li instruis ĉe la someraj kursoj en San Francisco State University, kaj en 1990 li eĉ estris la instruteamon ĉe la kursoj. Al la Estraro reelektiĝis *David Wolff*, kiu ludis gravan rolon en la aperigo de *Esperanto • Learning and Using the International Language* de David Richardson. Revenis al la Estraro, post plurjara foresto, *d-ro E. James Lieberman*, kiu siatempe estis Prezidanto de ELNA. Kaj tute nova Estrarano estas *Sherry A. Wells*, advokato kaj motoro de la Esperanto-movado en Miĉigano. Al ĉiuj mi sendas miajn—kaj espereble ankaŭ viajn—gratulojn.

Tamen, la mondo ne atendas dum ni haltas por gratuli unu la alian pri niaj diversaj sukcesoj. Intertempe alvenis la supera petletero de Sovetio.

Kion fari? Jen okazo fari ion pozitivan pri Esperanto, eĉ se la tujaj rezultoj plej evidentiĝos en alia lando. Sek kion pozitivan fari? Kion pozitivan ni povos fari?

Kiel mi indikis antaŭ kelkaj monatoj, USEJ jam de du jaroj malaperis; ĝi ne povas reagi. En la nuna Adresaro troviĝas la nomoj (kaj adreso) de entute 100 junaj

anoj de ELNA; mi esperas, ke ili unuope reagos, sed ĉar mankas al ili organizo, ili tute ne povos reagi grupe.

Mia propra respondo al s-ano Kudrjavcev estis la jena: mi aperigos lian leteron sur la paĝoj de nia organo (tion mi faris supre), kaj cetera aperigos, laŭ lia volo, la nomojn kaj adresojn de 70 el liaj mil gelearnantoj dum la venonta jaro en la rubriko "Volas Korespondi...". Mi sugestis, ke tiun sepdekon li elektu el tiuj, kiuj (a) volas korespondi kun usonanoj, kaj (b) plej sukcese aŭ obstine sekvas la koncernan kurson.

Mi ne scias, ĉu s-ano Kudrjavcev respondos mian leteron, ĉu ne (leteroj al Sovetio foje perdiĝas). Mi ne scias, ĉu lia eventuala respondo estos pozitiva, ĉu ne. Mi ne scias, ĉu li senkuraĝiĝos pro mia respondo. Mi ne scias, kiom el la mil novaj gelearnantoj de Esperanto daŭre sentos intereson, kaj kiom entute rezignos pri la lingvo, ĉar ili ne povos utiligi ĝin.

La problemo de s-ano Kudrjavcev ne estas nova. En la nuntempa Esperanto-mondo ekzistas fundamenta misekvilibro, kiun ni emas malatenti. Temas pri la fakto, ke kvankam nia mon(d)vido estas ĉefe okcidenta, nia parolantaro estas pliparte orienta.

Kontrolu mem. Kie troviĝas la plimultaj individuaj membroj de UEA? Ili nombras pli-malpli 7000, kaj ĉefe devenas de la Okcidento. Kaj kie loĝas la plimultaj aligitaj membroj? Ili nombras pli ol 30000, kaj pliparte devenas de Orienta Eŭropo.

En la korespondado troviĝas simila misekvilibro. Jam dum pluraj jaroj, la Korespondanta Servo Mondskala plendas pri la manko de okcidentaj korespondemuloj por plenumi la dezirojn de la orientaj kaj

triamondaj korespondpetantoj. Kaj eĉ sur la paĝoj de *Esperanto U.S.A.* vi povos rimarki tiun misekvilibron. En la nuna numero, el 37 nomoj en la rubriko "Volas Korespondi..." entute tri venas el la okcidentaj landoj—kaj por atingi tiun ciferon, mi devis kalkuli Koreion inter tiuj "okcidentaj" landoj.

Kiel reagos la homoj en tiuj landoj al tiu misekvilibro? Mi ne scias. Sed estas kelkaj malkvietigaj signoj. La iama fluo de korespondpetoj el Irano en lastaj jaroj sekigiĝis ĝis nura gutado. Nu, en Irano oni ankaŭ havas aliajn problemojn, kaj eble la internacia korespondado ne havas prioritaton. El Pollando, pasintjare venis al ni inter 100-200 korespondpetoj, kiuj aperis sur la paĝoj de nia revuo. Komparu la ĉiaran rikolton. Nu, jes, la kosto de letero al Usono ĵus pli ol dekobliĝis (pro la "ekonomiaj reformoj"), kion ne faris la salajroj; sed ĉu vere entuziasma esperantisto permesus al si rezigni fronte de nura inflacio? Aŭ ĉu tiuj sentas, ke kiam ili, je sufiĉe alta kosto, alvokas la okcidentantojn, reeĥiĝas nura...silento?

Kaj kio okazas, ekzemple, kiam ni okcidentaj esperantistoj devos fronti la milojn aŭ eĉ centmilojn da homoj, kiuj nun sekvas la tutlandan televidan Esperanto-kurson en Ĉinio? Ĉu ankaŭ ili, aŭskultante por voĉoj el la Okcidento, aŭdos nur...silento?

Relegante la leteron de s-ano Kudrjavcev, ĉiu usona esperantisto—precipe ĉiu juna esperantisto—pensu: ĉu ankaŭ mi havas ian respondecon por ĝustigi tiun misekvilibron, forigi tiun silenton?

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto In the Media

June Fritz, ELNA member in Wilber, NE, recently hosted Bernhard Westerhoff, a visitor from Germany, as described in the Crete, NE, *News* (June 20, 1990) in an article titled "Esperanto correspondent visits with Wilber couple." The article describes Westerhoff's use of Esperanto in his travels through the U.S.A., and mentions the ELNA Congress in Mexico City and the World Esperanto Congress in Havana. (sent by June Fritz)

The Milwaukee, WI, *Sentinel* (June 25, 1990), tells about an "Event to focus on Esperanto": a description of the third annual Midwest Esperanto Classes and Conference, hosted by the Esperanto Society of Wisconsin—Milwaukee. (from the Central Office)

Wim Thoeke (see last issue), meet Alex Trebeck. In the latter's popular television quiz show *Jeopardy* (June 26, 1990), one of the contestants successfully responded "Esperanto" to the \$500 "Languages" answer: Dr. L. L. Zamenhof, a Polish oculist, invented this International Language in 1887. (seen by Don Harlow, Bill Schulze, and goodness knows how many others)

Christopher Connelly, a Senior Editor of *Premiere* movie review magazine and a fixture on MTV, during a recent afternoon Geraldo Rivera talk show (July 13, 1990) described Arnold Schwarzenegger's new science-fiction film *Total Recall* as "an Esperanto of movies—totally without culture." He seemed to like the metaphor, inasmuch as he repeated it twice. (seen by

Sybil Harlow) (Editorial note: It always pays to react to such comments. The editor wrote immediately to Mr. Connelly—in a friendly sort of way, of course—and Mr. Connelly sent, by return mail, a \$25 donation for ELNA.)

An editorial cartoon by Jack Ohman in the Portland, OR, *Oregonian* (July 6, 1990) shows Mikhail Gorbachev in company with a somewhat glum George Bush facing a lemonade stand run by NATO, the Nice American Treats Organization. The stand offers, among other things, "Non-violent conversation"; to ensure the availability of this commodity, a separate sign-up sheet for Esperanto lessons is posted on the stand. (from the Central Office and Anne Whitteker)

John Sinor, columnist in the San Diego, CA, *Tribune* (July 26, 1990), mentions the 103rd birthday of Esperanto but also comments that, as far as he can tell, "hopes have dwindled [for Esperanto]." The rest of the column is devoted to a description of language problems, and Mr. Sinor concludes—fairly accurately—that "world communication is in deep trouble." (sent by Frank Helmuth)

"What does the artificial language Esperanto have in common with the sexual revolution?" asks columnist Cathy Young in *The American Spectator* (August 1990) column "Soviet Presswatch." Young goes on to quote Soviet writer Yevgeny Ovanesyan's intimations that "both are part of a Jewish plot to corrupt Mother

Russia." Young adds: "Thanks to the spiritual power of the Russian tongue, says the writer, the country has resisted the Esperanto invasion." Complacent readers please note, however, that at the Havana UK the Estonian and Ukrainian Esperanto Associations became the fourth and fifth intra-Soviet national Esperanto organizations to affiliate with UEA... (sent by Jack and Sally Lesh)

The Ponderosa Bark (Spring/Summer 1990), newsletter for Ponderosa Village at Goldendale, WA, in an article describing Dori and Roli Vallon-Wheeler's recent sojourn teaching English in Anhui, China, talks about Dori's friendships through Esperanto and her participation in the first Asian Conference of Esperanto Instructors. (from Dori Vallon-Wheeler)

The San Francisco, CA, *The Exploratorium Quarterly* (Summer 1990) has a three-page article about Esperanto, "The Twittering Machine," by Gary Crouse. Crouse describes his hobbyist interaction with Esperanto in some detail, comparing that with his high-school study of Latin (a comparison with which this editor is quite familiar). He shows good familiarity with the better-known aspects of Esperanto's history, but little acquaintance with its current situation, and finishes with several of the standard dilettante recommendations for modifications to the language. An additional page contains a very good introduction to the structure of the language. (provided by William R. Harmon)

THIRD ANNUAL MIDWEST ESPERANTO CLASSES AND CONFERENCE

by Sherry A. Wells

The 3rd Annual Midwest Esperanto Classes and Conference doubled the attendance of the first such event! Persons came from five states for the 30-hour beginners' class taught by Dr. Pierre Ullman of the University of Wisconsin, or the intermediate class taught by

Leszek Kordylewski of Poland, who is now at the University of Chicago. Evaluations ranked these courses well. Organizers were Bob Swenson, Jerry Veit, Armin Doneis, Jr., and Dr. Ullman.

Conference speakers were: Armin Doneis, Sr., who drove up from Texas for "Confessions of a Half-Baked Esperantist"; Ron Glossop, who spoke of "Reaching Children with Esperanto" and displayed his work with Charlotte Kohrs; Leszek Kordylewski, who encouraged us to let the rest of the world know that there is an Esperanto movement in the US;

Yang Ren of Manchuria and *El Popola Ĉinio*, who was assigned by that magazine to submit an article and photos of the event; and Sherry Wells, who led a discussion on "Publicizing and Promoting Esperanto."

Publicity about the event reached the pages of the Milwaukee, WI, *Sentinel*, the Shepherd Express, the University of Wisconsin—Milwaukee Times; and there was a 30-minute plug on local talk radio WTMJ.

Plans are underway for the Fourth Annual Midwest Classes and Conference.



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanta Agado en Usono

CALIFORNIA

La 24an de junio, 1990, pli ol 300,000 homoj partoprenis la Paradon de Geja Fiereco en San-Francisko. Inter ili, kun ŝildo blazonita per la vortoj "Geja Esperantistaro kaj Amikoj", marŝis membroj de la sanfranciska filio de la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, kaj gejoj kaj negejoj geesperantistoj el diversaj regionoj de Norda Ameriko kaj Japanio. La paradantoj disdonis plurmil informilojn pri Esperanto, LSG, kaj la gejojita poŝta kurso de Esperanto. Ke la afero sukcesis, tion pruvas la leteroj kiuj datire alvenas al la poŝtkesto de LSG en San-Francisko.

INDIANA

Esperanto-Klubo de Indiana nun ekzistas. Post la prelego de Sherry Wells pri Esperanto al la loka Menso-Klubo, Indiana-grupo formiĝis je la 13a de aprilo, 1990. Por adreso, vidu la liston de lokaj grupoj. La 21an de julio Sherry revenis por instrui kvinhoran kurson por komencantoj al 13 personoj, el kiu kvar venis rezulte de sepminuta radioanonco la 19an de julio je WIBC Indianapolis. Partoprenantoj alvenis eĉ de Louisville, KY. (sendis Sherry Wells)

MICHIGAN

La ĉiujara piniko de la Esperanto-Societo

de Michigan allogis pli ol dudek esperantistojn al sia unua eksterŝtata okazo, ĉe la hejmo de d-ro Steven Tchudi, kiu baldaŭ translokiĝos al Nevada. Publico enkludis novajartikolon, kiun instigis d-ro Tchudi kaj kiu allogis unu personon al la pikniko; ankaŭ ĉeestis ĵurnalisto ĉe la pikniko. (sendis Sherry Wells)

MENSA

Sherry Wells aperigis modestan reklamon en du numeroj de la nacia bulteno de Mensa. Pli ol 40 personoj jam respondis al ĝi, kaj multaj jam komencis studi en la poŝta kurso sub mentorado de Phil Driscoll. (sendis Sherry Wells)

SOME ADDITIONAL NOTES ON THE ELNA CONVENTION

Cathy Schulze

No doubt a high point of the week was the reception on the final evening at the beautiful home of the Jesus Najera family. On the outskirts of the city it sits high on a hill with a vast panorama of the lights of Mexico City. In addition to several of us from ELNA there were Ada Fighiera-Sikorska, editor of *Heroldo de Esperanto*; Gunther Becker, former president of TEJO, the international Esperanto youth organization; and many others. A great dinner for about forty people ended with cutting of a huge cake with Esperanto inscription. The Najeras produce television films so there was lots of filming.

One of the sons-in-law accompanied us on a large Cassio keyboard in a sing-along which threatened to go on to the wee hours until remembering that we had to be up at 4 a.m. for our flight home brought unforgettable festivities to an end for some of us. That beautiful, big Najera family provided a perfect climax to a marvelous week.

Returning home via United Airlines, I read an editorial by their president, Stephen M. Wolf. Commenting on our national July 4th observances, he wrote:

"Tolerance and acceptance certainly are noble ideals for a nation, but without the full support of a nation's people, they are quite empty propositions... Lyndon Johnson understood that well. He stated: '...our American unity

does not depend upon our unanimity. We have differences but now, as in the past, we can derive from those differences strength, not weakness, wisdom, not despair.'"

(United magazine *Vis a Vis*, July, 1990)

Thinking back over ELNA's 28th Convention, I got to pondering the work of our dedicated Executive Board and the business meetings of the general assembly. Remembering the words of one of the foreign Esperantists: "Your business meetings are so friendly", I was pleased that ELNA members, in spite of widely differing viewpoints, manage to get things done without rancor. I am happy, too, that our new president, Angela Harlow, plans to carry on this tradition.

FROM THE HEART OF A BAZA STUDENTO

by Doris Jaderstrom

When I met Toshiko Sato from Tokyo at San Francisco Airport on June 17, 1990, all we could do was greet each other with a smile. There was hardly any communication between us. But on July 7, when I saw her off at the same airport, we were communicating like old friends. This can be a summary of my experience with Esperanto. It was incredible! I never believed I could be speaking a new language in three weeks and have so much fun in learning it. I enjoyed every moment of the 21st Esperanto Summer Session at San Francisco

State University, and was sad in leaving it.


As a young girl growing up in Hong Kong, I began learning English when I was about eight or nine. The process of learning was painful. I began to feel comfortable with the English language only after at least 20 years of using it. I am still not completely confident with it.

I wonder: Had I learned Esperanto first, before English, might I then not have had to suffer that long? As an elementary school teacher in a San Jose public school, I also wonder: What if Esperanto were to be adopted in the classroom where it might benefit both the FEP (Fluent English Proficiency) and the LEP (Limited English Proficiency) students? Esperanto could be used as a tool to help the LEP students learn

English, and as an academic enrichment for the FEP students to learn the process of language and of communicating with the world. In this way we might not have to sacrifice the learning of either group in a bilingual class.

I am truly indebted to my husband Reginald, Cathy Schulze, and many other people who have given me the inspiration and support for the Esperanto experience. The three professors were great. Each had a different style and a specific teaching method. They worked together as a team, and they were like gems. They were able to create wonders with their students. To each of the participating members: I really treasure the experience which we shared together, and I hope that we will meet again.

Dankon kaj bonŝancon!



LA CENTRA OFICEJO

Two of the most important services ELNA offers to the Esperanto speaking community in the United States are its book and subscription services. Through these two services, Esperantists can be kept abreast of the worldwide Esperanto movement and have at their fingertips a wealth of literature that would otherwise be difficult to obtain.

I call these "services" because the expense and amount of work involved do not generally make them self-supporting ventures. They are, however, vital to the development of the Esperanto speaking community, and therefore vital to ELNA.

Esperanto book and subscription services throughout the world suffer the same problems that many "minority" language services do. Although this is unavoidable, we in the Central Office are dedicated to minimizing these problems and making available the widest selection of books and magazines at reasonable costs.

What kinds of problems are we talking about? The most severe problem we face is that of back-ordered items. While it would seem a simple matter of placing an order for back-ordered items, there are other factors that often complicate things.

The first factor is the international postal system. While our orders which are sent by airmail will get to most international destinations within a reasonable amount of time, there are snags in individual national systems that often delay delivery. Italy and Brazil are prime examples, with Brazil having one of the worst systems we have dealt with.

Because airmail shipment of books would force ELNA to charge prohibitively high fees, we must have all materials shipped by surface mail. This will usually add another month or two to the delay between when we order our books and when they arrive. The average waiting time that we face is four months.

In Europe, surface mail is no problem because of the well-developed rail systems that make it economical to ship books from country to country in short time.

The second factor is the suppliers themselves. Many Esperanto publishing and subscription firms are run by volunteers or very small staffs. If we order something that is out of print or out of stock, we may or may not receive notification of this. Because we are accustomed to waiting four or more

months we have no way of knowing that something is wrong, and in the meantime backorders and customer dissatisfaction grow.

The obvious solution is to order more copies of the books we stock in the first place. For years the policy in the Central Office was to order three copies of each book we intended to offer. This number is based on the minimum number of books we could buy to receive a discount. We now order more copies of each book we stock on the assumption that with a larger membership base we can risk more on each title and that we will eventually sell all material in stock.

Also, when planning our annual catalog we try to avoid backorder problems by stocking up on items we believe will sell well. This process starts immediately after the production of the current edition of the catalog so that we have a full twelve months to recognize any problems with supplies.

For items that are the "meat and potatoes" of the ELNA book service, such as dictionaries, textbooks, etc., we try to order supplies for one or two years so that we will have more than enough on hand to supply our needs and allow us to keep prices stable.

Because of the increase in membership over the past three years, and because of two large injections of capital ELNA has received from Ella Gibson and John Massey, we are able to spend more money and time on the book and subscription services.

Services have improved, yet without a significant increase in our membership base and in our endowment fund, ELNA book and Subscription services will not increase noticeably, and other activities and programs supported by ELNA will not be able to grow.

FINAL NOTES: Due to the recent political, economic and social changes occurring throughout the world, Esperanto publishing and subscription services are faced with many problems and opportunities. Hungary and Brazil have been especially hard-hit.

The periodicals *Fokuso* and *Hungara Vivo* are not in print at this time, and we are working to arrange repayment to those who have subscribed through the ELNA subscription service.

Fonto, *Simpozio* and *Lingva*, all published in Brazil, are also experiencing diffi-

culties due to recent economic changes. According to our information, they will be published, but will be shipped in groups of several issues at a time.

-Mark Stephens
Director, C.O.

TRI EL HAVANO

de Otto Prytz

[Bill Harmon reportis al ni la jenajn limerikojn, kiujn verkis esperantisto Otto Prytz okaze de la kongresoj en Meksikio kaj Kubo.]

La Omaĝo

Okazis Kongres' en Havano
Kun vasta program' laŭ la plano.
Krom ĉe la koktel'
Dum kiu Fidel
Deklaris sin Samideano.

[Klarigo: Fidel Castro, kiu aperis dum la Kongreso, laŭdire anoncis sin "soldato por Esperanto."—DH]

Satira

Kongres' en Havano nin spronis
Kaj multe da ĝu' al ni donis.
Sed kia terur'
Dum la inaŭgur':
Post himno "La Bamba" eksonis!

[Klarigo: Solene ĉiuj staris kiel kutime dum la kantado de la himno, kiun gvidis iu virino ĉe fortepiano sur la scenejo (sen ia paŭzo, tamen, inter la strofoj!). En la koridoro malantaŭ la lasta balkona seĝovico la kongresa ĥoro staris kaj, post la lasta noto de la himno foreĥis, akapele kantis—himnece, solene, malrapidtakte—la Kubajon kiun oni pliofte aŭdas en dancejoj, "La Bamba"! Neimagebla momento...—WRH]

Postkongreso

Meksikon vizitis kuraĝo
Postkongresanaro vojaĝa.
Pleplena da saĝ',
Ĉar nia mezaĝ'
Sendub' estis pli ol mezaĝa.

POR STARIGOTA JUNULARA SEKCIO DE ELNA—KIEL ESPERANTO- ASOCIO DE O.Ĉ.N.U. FUNKCIAS

de Ĉien Minĉi

[S-ino Ĉien Minĉi, Vicprofesoro de la Angla kaj Esperanto en la Orient-Ĉinia Normala Universitato (Ŝanhajo) kaj fakdelegito de UEA, kiupartoprenis en la SFŜU Someraj Kursoj de 1982 kaj 1983 kaj nun revizitas Usonon, responde al la ĉefartikolo de nia n-ro 1990(3) priskribas la devenon kaj agadon de la Esperanto-Asocio en sia universitato en Ĉinio.]

Mi skribas pri E-Asocio de OĈNU (Orient-Ĉinia Normala Universitato) ĉar unue, *Esperanto USA* diskutis pri sia restarigo de landa junulara E-organizo en la ĉefartikolo de Numero 3, 1990, eble nia praktiko iel stimulas plibaldaŭe starigi junularan sekcion de ELNA? Due, pro vizo-problemo mi malsukcesis partopreni tra Usono ĉijaran ELNA-Kongreson en Meksikio kie mi intencis paroli pri la studenta E-Asocio de nia universitato.

E-Asocio de OĈNU estas unu el la kelkdekaj studentaj organizoj sub la universitata societaro. Post sia fondiĝo ĝi ricevis honoran titolon de A-Grada Societo dum daŭraj tri jaroj, kaj mi kredas, ke neniu studenta E-asocio en Ĉinio, se ekzistas iuj aliaj, estas komparebla kun la nia nombre kaj nivelo.

Nia universitato havas tradicion de E-instruado ekde la fruaj sesdekaj jaroj, sed bedaŭrinde dum longa periodo ne multe da E-movado. En la Fremdlingva Fakultato, kie mi laboras, Esperanto estas instruata kiel aŭ la dua fremdlingvo aŭ nedeviga kurso de 1964 ĝis nun, kaj nenio okazis krom tio kvankam ni sentis nin fieraj ĉar kvin studentoj fariĝis profesiaj esperantistoj post sia studado en OĈNU en malsamaj jaroj, laborante por Esperanto-Sekcio de Radio Pekino kaj *El Popola Ĉinio*. Tamen en la historie grava jaro, 1987, io ja okazis!

En la somero de 1987, por celebri la centjaran jubileon de Esperanto mi petis la lernejan administrejon, ke mi okazigu ekstran E-somerkurson. Aŭdinte mian klarigon la instancoj jesis. Dek-ok studentoj venis de diversaj fakultatoj de Ekonomio, Historio, Biologio, Matematika Statistiko, Komputila Scienco ktp, malmultaj, tamen ili simbolis verdajn semojn en nia lernejo.

La kurso daŭris dum kvin semajnoj, dekdu lernohorojn en ĉiu semajno, kaj ĝi verŝajne sukcesis—la kursanoj, speciale kelkaj fervoruloj, ne nur serioze lernis la lingvon sed ankaŭ entuziasme ekpensis pri starigo de studenta E-asocio.

Post kelkmonata preparado—efika propagandado kiel sloganoj, E-libroekspozicieto, publikparolo pri “Kio Estas Esperanto”, E-danĉefesto, prezento de E-teatraĵeto “La Vazo” de Stefan MacGill, kaj eĉ ekinstruo de E-ABC, por ke tiel multaj homoj kiel eble en la universitato informiĝu pri Esperanto—ili laŭplane je la fino de 1987 starigis sian E-asocieton. Post tio la esperantistaj studentoj multege laboris. Ili elektis estraron kun Ho Miao-zhuang, tiama duagrada studento en la Fakultato de Biologio, kiel la unua prezidanto; ili grupigis membrojn kiuj pli bone parolis la lingvon kiel instruantojn por dumsemestraj kaj vintraj E-kursoj por studentoj en OĈNU (tamen ankaŭ de aliaj kolegioj kaj eĉ aliaj urboj kaj provincoj venis lernantoj kiuj ne trovis taŭgan lokon por lerni Esperanton); ili varbis novajn membrojn post ĉiu kurso kaj ĝis nun jam estas 250 membroj; ili organizis serion da prelegoj nomatan “Prelegoj Por Esperanto-novjarcento”. Ili estis prelegoj de Esperanto-bazscio de Prof. Jin Shao-ying de Fu-dan Universitato, pri UMEA-Kongreso en Belgujo de s-ro Cui Zi-jin, kaj pri la 72a UK en Varsovio de s-ino Ŝijiming. Mi foje prelegis la temon “DUE, UEA-gvidlinio de la Dua Jarcento”. Eĉ s-ro Simo Milojeviĉ, Ĝenerala Direktoro de UEA, estis invitita al OĈNU por prelegi pri eŭropa E-movado kiam li hazarde vizitis nian urbon. Kaj certe estis aliaj prelegoj, kiujn mi ne memoras nuntempe. Kion alian ili faris? Ili okazigis konkurson de Universitata Esperanto, kiun partoprenis ne nur niaj studentoj, sed ankaŭ E-lernantoj de Shanghai-a Fremdlingva Instituto, Jiao-tong Universitato, Fu-dan Universitato, kaj tiuj de ĉirkaŭurbaj E-Asocio; ili redaktis kaj ekeldonis revuon *EDENO* kiu aperas ĉiun semestron kaj estas tre ŝatata de junaj esperantistoj. *EDENO* estas en du lingvoj, Esperante kaj ĉine—ĉiun artikolon aŭ eseeton sekvas traduko en la ĉina lingvo, tial ĝi

estas ankaŭ bona propagandaĵo de nia lingvo al ĉiuj kiuj povas legi la ĉinan. Jes, junaj esperantistoj de OĈNU, same okupitaj kiel ĉiuj studentoj, ja multe faris kaj dediĉis sin por teni la vivecon de la Asocio kaj vivigi Esperanton.

Vi eble demandus, kiel la studentoj povas sin subteni finance. Durimede la Asocio travivas: kotizoj de la Asociomembreco kaj de E-kursoj, kaj ĉefe ĝi estas subtenata de la lernejo, ekz. por ĉiu numero *EDENO* bezonas pli ol 1,000 juanojn, kiu egalas meznombran monatan salajron de dek ĉinoj. Ju pli bone la Asocio disvolviĝas, des pli volonte la lernejo subtenas ĝin. Mono estas tre grava por E-agadoj, sed la junuloj ofte diras, ke pli grave estas, ke Esperanto devas esti uzata kaj ligita kun fakoj. Tial esperantistoj de OĈNU atente daŭrigas E-instruadon, kaj pli atente kunigas la lingvon kun diversaj fakoj. Laŭ tiu celo studentoj skribis fakajn referatojn en Esperanto por unue prezenti ilin en la lerneja akademio kunveno en Esperanto, kaj tiuj pli bonaj estas akceptitaj de IAKSTE (Internacia Akademia Kongreso de Scienco kaj Tekniko en Esperanto). En la 2a kaj la 3a IAKSTE-oj en 1988 kaj 1990 ni havis studentajn reprezentantojn parolantajn pri diversaj fakoj en Esperanto.

Ĉu estas aliaj problemoj por junulara asocio? Jes. Ni pli kaj pli konscias, ke Asocio devas havi taŭgan daŭriganton, speciale en lernejoj kiujn ĉiuj forlasas post kelkaj jaroj. Bonŝance ni nun havas la trian prezidanton nomatan Li Liu-zhen, kiu daŭre studos en OĈNU dum tri jaroj por magistro de Pedagogio.

Ni kredu, ke Esperanto multe plibone venkos se junularo en la tuta mondo pli kaj pli fariĝos esperantistoj kaj havos siajn proprajn E-asociojn.

[Se vi volas senpere kontakti la E-Asocieton de OĈNU por fari specifajn demandojn pri la agado, vi rajtas skribi al: F-ino Li Liu-zhen, Fakultato de Edukado, Orient-Ĉinia Normala Universitato, CN-200062 SHANGHAI, Peoples Republic of China. Estus ĝentile sendi kun via letero du Internaciajn Respond-Kuponojn por helpi pagi la sendkoston de respondo.]

ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Nur por niaj eksterlandaj anoj: Oni povas ricevi unujaran abonon al la nova kvaronjara revuo de la Kuba Esperanto-Asocio, *Avanco*, transpagante 6 guldenojn (proks. \$3) al la konto de KEA keax-u ĉe la Universala Esperanto-Asocio. Unuopa numero kostas 2 guldenojn. Enlandaj anoj bonvolu memori, ke estas kontraŭleĝe transpagi monon al kuba asocio aŭ instanco, kaj kvankam tiaj pagoj pere de UEA estus efektive nespureblaj, tamen laŭ la vortoj de nia karmemora Prezidanto Richard M. Nixon (en alia kunteksto), "That would be wrong." Informadreso: Kuba Esperanto-Asocio, Apartado Postal 2018, LA HABANA 2, Kubo.

Ĝis la komenco de septembro, la elsendfrekvencoj (en kHz) de Radio Havano Kubo por la Esperanto-dissendoj estas: (1700-1730 UTC) 15340, 15285, 11970, 11760, 11705, 9640; (2230-2300 UTC) 11970, 11950, 11910, 5985. Petu pliajn informojn ĉe: Radio Havano Kubo, Esperanto-Redakcio, Poŝtako 70 26 aŭ 62 40, HAVANO, Kubo.

Kolekto de korespondpetoj (ĉirkaŭ 45 el diversaj landoj en ĉiu numero) estas havebla de: R. Melo, Villa Esperanto, 34 ave. de Russie, F-03700 BELERVILE SUR ALLIER, Francio, kontraŭ du usonaj dolaroj aŭ tri internaciaj respondkuponoj. Al la sama adreso vi povas sendi vian korespondpeton, kiu aperos senpage en unu el la listoj.

We print the accompanying advertisement as a favor to the United Nations Association, with which ELNA is associated.

Available early September

Contents

I.
*Dispute Settlement
and Decolonization*

II.
*Arms Control and
Disarmament*

III.
*Economics and
Development*

IV.
*Global Resource
Management*

V.
*Human Rights and
Social Issues*

VI.
Legal Issues

VII.
*Finance and
Administration*

Index

It's time to order your copy of UNA's indispensable guide—*Issues Before the 45th General Assembly of the United Nations*

The major international developments from the fall of 1989 through the summer of 1990, with special emphasis on the agenda and activities of the United Nations:

- Environmental protection
- Mideast peace process
- U.S.-Soviet cooperation
- Peacekeeping operations
- Namibian independence
- Drug trafficking
- Human rights
- World health/AIDS
- Antarctica treaties
- Third World debt
- Disarmament issues
- Status of women

An invaluable reference for students of international affairs, an indispensable manual for scholars, diplomats, and journalists. Thorough, well-documented, fully indexed.

Orders filled promptly and shipped via UPS to permit discussion in fall-semester courses before the opening of the General Assembly. Paper; approx. 250 pp. Published by UNA-USA in conjunction with Lexington Books.

To order:

Rates:

- 1-10 copies \$14 ea.
- 11-50 copies \$13 ea.
- 51 & over \$12 ea.

Note:

UNA members and members of UNA's Council of Organizations take 20 percent off.

Orders shipped promptly via UPS.




United Nations Association of the United States of America

485 Fifth Avenue, New York, N.Y. 10017

- Please send me _____ copies of *Issues Before the 45th General Assembly*. My check for \$ _____, payable to UNA-USA, is enclosed. (We pay the postage.) Please bill me. (Postage additional.)
- NAME _____
ADDRESS _____
